INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 15 **N-ro 3, 1985**

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 3, 1985

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090
Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

Estraro de ILEI

Prezidanto:	Istvàn SZERDAHELYI, prof. d-ro Eötvës Loràand Tudomànyegyetem Bölesészettud. kar, PF 107 BUDAPEST 4 Hungario.
Vic-prezidanto:	Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A B-2180 KALMTHOUT. Belgio.
Sekretario:	Catina Giulia DAZZINI. Via Palestro, 36, Casella Postale 22. 54100 MASSA. Italio. Telef. 0585/41756.
Vic-Sekretario:	Marin BACEV. Hr. Botev 99 Poŝtkesto 1054. BL–1303 SOFIA. Bulgario.
Financoj:	Bertil ANDREASSON, Södra Rörum, PL 455. S–24 200 HÖRBY. Svedio. Telefono 0415-50152.

Enhavo

0. Dua honora membro de ILEI: d-ro Mario Dazzini . . . . . H.S.
1. Retrospektivo kaj nova estraro de ILEI . . . . . H. Sonnabend
2. La rolo de instruado en la Esperanto-movado . . . . . H. Tonkin.
3. English "yes" / Esperanto "jes" — Lingvoj kiel partneroj . . H. Sonnabend.
4. Kion bezonas la sciencistoj: la lingvon Esperanto aŭ la kodon «Internacia Lingvo»? . . . . . B. Golden.
5. Kiel recenzi lernolibrojn? . . . . . B. Golden.
6. Rezolucio de la 19-a Konferenco en Kungälv 1985 . . . . . - - - - - - - - -



La dua Honora Membro de ILEI

D-ro Mario Dazzini

unuanime elektita la 5-an de aŭgusto 1985

dum la publika kunveno de ILEI, okazinta en la kadro de la 70-a Universala Kongreso de UEA en Aŭgsburgo, FR Germanio.

Ĉiu estanta kaj estonta ILEI-ano eterne gardu memoron pri li!

Retrospektivo kaj nova estraro de ILEI

Estimataj kaj karaj gekolegoj,

La asemblea kunsido de la 19-a konferenco en Kungälv, Svedio, de 22.07 ĝis 29.07. 1985 elektis novan estraron de ILEI, ĉar kvar postenoj estis vakantaj: prezidanto, ĝenerala sekretario, vic-prezidanto kaj vic-sekretario.

D-ro Dazzini forpasis. Mi, post 17-jara membreco en la estraro (5 jarojn vic-prezidanto, 12 jarojn prezidanto), ne plu estis preta denove kandidati; vic-prezidantino A. Hurĉak kaj vic-sekretario Prof. F. Zaragoza Ruiz same ne plu pretis daŭrigi siajn oficojn.

Dum ĉiuj jaroj d-ro Mario Dazzini kaj mi intense kaj amike kunlaboris. Ni ambaŭ komencis kune kun R. Markarian (Britujo), kiu estis freŝe elektita prezidanto; Mario Dazzini, ĝenerala sekretario; S-ino A. Andersson, kasistino kaj S-ro G. Turin, vic-sekretario.

La jaraj kotizoj siatempe sumiĝis je 1/2 guldenoj, malmultaj sekcioj kaj la prestiĝo kaj agnosko ne tro grandaj.

De 1968 ILEI plane kaj metode esploris eblajn vojojn por en lernejoj kaj per eksperimentoj pruvi la taŭgecon de Esperanto kiel ideala dua lingvo por internaciaj rilatoj inter gelernantoj.

Dum Pasko 1968 kunvenis esperantistaj pedagogoj en Maribor, Jugoslavio, por enketi la instruan evoluon de Esperanto en Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio. Ili nomis sin "Kunordiga Pedagogia Konferenco por Enkonduko de Esperanto en lernejojn".

Pluraj konferencoj sekvis. La rezultoj vekis la intereson de koncernaj ŝtataj instancoj. Kaj sub iliaj aŭspicioj ekkomencis trijara lerneja eksperimento de 1971 ĝis 1974. Tridek klasoj el 4 landoj sub la gvidado de prof. d-ro I. Szerdahelyi partoprenis.

En 1974 ILEI decidis en la Internacia Domo Sonnenberg (FR Germanio) pri nova paŝo sur la bazo de bonaj rezultoj de la unua eksperimento: organizi duan eksperimenton en elementaj lernejaj klasoj, t.e. triaj ĝis sesaj klasoj. Konferencoj okazis en Antverpeno kaj Hannut (Belgujo). Mi transprenis la komision, evoluigi instruprogramon, kontakti instruajn instancojn, geinstruistojn en Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Germanio.

Post pena klopodado interkonsentis unu lernejo en Belgujo, tri lernejoj en Francujo, tri en Nederlando, kaj tri lernejoj en Germanujo — sume 327 gelernantoj — partopreni la eksperimenton. Ĝi daŭris de 1975 ĝis 1977.

Du eventoj emfaze substrekis la du eksperimentojn:

Internacia Lernejo en Primoŝten, 1974
(pli ol 100 partoprenantoj);
Internacia lernejo en Saint Gérard, 1977
(sume 144 partoprenantoj).

Por la dua eksperimento aperis ampleksa raporto en "Esperanto: Lerneja Eksperimento" (Edistudio 1979). Ĝi estas la unua libro inter Kajeroj de Internacia Pedagogia Revuo. *Bedaŭrinde pri la rezultoj de la unua eksperimento vi nur povas legi fragmentajn traktaĵojn en* Paderbornaj Laborpaperoj, *tie publikigitaj de d-ro Szerdahelyi.*

En 1973 reaperis IPR, eldonita de Ludwig Pickel.

Ĝis 1981 la estraro devis grandparte mem pagi sian laboron. Ĝi

strebadis konatigi ILEI en Eŭropo kaj Afriko kaj praktikis tre konkretajn paŝojn. La estraro kunvenis dufoje inter la konferencoj en elektitaj urboj, ekzemple Parizo, Vieno, Budapeŝto, San Marino, Tananarivo, Hanovro, Londono, Strasburgo. (Jen la kostoj por la estraro.) Ĉiam ni loke kontaktis pedagogiajn instancojn, parolis kun ministroj, universitataj rektoroj aŭ lernejaj inspektoroj.

Ĉiujaraj konferencoj fariĝis tiam la regulo. La protokoloj raportas pri serioza laboro, per kiu reliefiĝis kaj leviĝis identeco kaj prestiĝo de ILEI. Ĉiu inaŭguro estis manifestacio de niaj intencoj. Regule partoprenis elstaraj gastoj kaj ofte regionaj eminentuloj (en San Marino, episkopo kaj ministroj). Interesaj pens-interŝanĝoj sekvis kaj ne malofte lernejaj instancoj ebligis eksperimente instrui Esperanton. Rektaj interparoloj kaj personaj kontaktoj estas pli efikaj kaj trafaj ol multe da strategio kaj taktiko. (Pacamaj esperantistoj ne pruntu terminojn el la milita lingvo.)

Jen estas la demando: ĉu nepre ILEI pro pli oportunaj kaŭzoj akompanu UEA al kongresaj landoj, laŭ la moto "kien vi iros, ankaŭ mi iros"? Ni prijuĝis la lokon de niaj konferencoj laŭ utilaj vidpunktoj, konsiderante la situon de la landoj kaj de niaj sekcioj. Do, ni preferis landojn, kies lingvoj ne estas instruataj kiel fremdaj lingvoj.

Granda avantaĝo ĉiam estis, ke ni konferencis nur en domoj, en kiuj la konferencanoj laboris, manĝis kaj loĝis sub la sama tegmento. Sendube tiu sistemo donis ĉiam harmonian kunvivadon.

Komence de la sepdekaj jaroj ILEI perdis sian staton ĉe UNESKO, ĉar siatempe tiu ne plu toleris du Esperanto-organizaĵojn. La estraro esploris do novajn eblecojn kaj konstatis, ke ILEI ne estas Esperanto-ligo, sed internacia unuiĝo de instruistoj pri diversaj fakoj, kiu kiel organizaĵo en la mondo aplikas nur Esperanton kiel komunan lingvon. Ni novproponis nin tiamaniere kaj UNESKO akecptis nin en aŭgusto 1977 en kategorio C.

Lasta akiro: La Respubliko San Marino donis al ni la juran personecon.

La jaro 1974 estis sorta evento por ILEI. Siatempe la estraro ne povis akcepti certajn eventojn en la hamburga Kongreso de UEA. Du jarojn poste d-ro Dazzini, mi, kaj la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, renkontiĝis en Nederlando kaj interkonsentis pri nova

kunlaboro. (Tiu interkonsento garantias nian kategorian staton en UNESKO.)

Kial la kunlaboro tamen ne bone funkciis, kaj eĉ malsanis, havas diversajn kaŭzojn. La nova estraro de ILEI kaj UEA unuanimas nun plibonigi la interrilatojn. La nova prezidanto de ILEI sendube ĝuas la konfidon de niaj iamaj socialismaj sekcioj, ke ili ĉiuj povas reiri al la Ligo.

Kun granda plezuro mi povas prezenti al vi la novan estraron de ILEI, kiun la asembleo en Kungälv laŭ mia propono elektis:
prezidanto: prof. d-ro István Szerdahelyi, Hungario;
vic-prezidanto: Edward Symoens, Belgio;
ĝenerala sekretario: d-rino Catina Dazzini, Italio;
vic-sekretario: Marin Baĉev, Bulgario;
*estrarano pri financoj:*Bertil Andreasson, Svedio.

La domo de ILEI estas konstruita. Restas nun la tasko de la nova estraro zorgi por la domo, t.e. plibonigi ĉion, fortikigi kaj konservi ĝin. Apartan dankon meritas d-rino Catina Dazzini; ŝi sindone transprenis la ŝarĝon de Mario Dazzini. Ŝia preteco tre trankviligas min, ĉar nur ŝi en la estraro konas la tutan evoluon de ILEI dum la pasintaj deksep jaroj. Ŝi partoprenis ĉiujn niajn estrarkunsidojn kaj tre ofte donis al ni prudentajn kaj saĝajn konsilojn. Ŝi estas nun la ĝenerala sekretario kaj la artikolo 9 de nia statuto en ĉiuj punktoj sen iu ajn modifo absolute validas. La tuta estraro estas ligita al la statuto, ĉar tiu estas pli ol nur paragrafoj; ĝi estas plenumenda programo.

Menciinde por la gelegantoj de IPR estas, ke mi kiel redaktoro nun ĉesigas mian laboron. Numeron 1 de 1986 aranĝos la nova estraro de ILEI.

Mi kore salutas miajn multajn gekolegojn, dankas pro la granda pacienco kaj petas lojale kaj honeste plu apogi nian Ligon.

Via, *Helmut Sonnabend*

La Rolo de Instruado en la Esperanto-Movado

Humphrey Tonkin

(Parolado farita dum la 19-a Internacia Konferenco de ILEI)

Dum la 19-a jarcento, ekestis en Usono tre interesa religia sekto — inter la multaj utopiaj kaj religiaj komunumoj, kiuj dum tiu epoko punktis la kamparon de la lando. Tiu sekto estis nomata *The Shakers,* la skuiĝantoj, tiel nomataj pro siaj religiaj dancoj. Paralele al la Esperanta vorto *kvakero,* ni nomu ilin *ŝakeroj.*

En sia diservado, la ŝakeroj aparte emfazis muzikon — ne nur por la dancado sed ankaŭ por la kantado de himnoj. Multaj ŝakeraj ritmoj, riĉaj je siaj melodioj, enradikiĝis en la amerikan himnaron, kaj estas ankoraŭ kantataj. Egale famaj estas la mebloj de la ŝakeroj — precipe belaj lignaj seĝoj, simplaj laŭ sia formo, funkciaj, puraj. Iliajn desegnojn oni ankoraŭ uzas en la meblofabrikado.

Sed la ŝakeroj mem, spite siajn belajn kaj ĝojajn kantojn al Dio, spite siajn meblojn, sian simplan arkitekturon, malaperis. La lastaj ŝakerinoj mortis antaŭ nur nelonge en Nov-Hampŝiro, kie ili vivadis en unu el siaj iamaj komunumoj. Kial tiu bela kaj ĝoja socio ĉesis ekzisti? Nu, unuavice ĉar ili kredis je absoluta seksa abstino. Karakteriza eco de iliaj komunumoj estis apartaj dormejoj por viroj kaj virinoj: la divido inter la seksoj estis kompleta.

Unu el la rezultoj de tio estis, evidente, ke ekzistis tre malmultaj ŝakeraj familioj: konvertiĝo al ŝakerismo esence signifus finon de la familia vivo. Konvertiĝoj ja okazis, sed nur tre specifaj tipoj de homoj emis tiel interesiĝi pri la ŝakera movado — kaj la ŝakeroj ja plene dependis de konvertiĝoj. Ne eblis naski ŝakerojn: oni devis ilin konverti.

Inter la ŝakeroj kaj la esperantistoj estas multaj similecoj. Same kiel la ŝakeroj, ni kantas niajn kantojn, ni ĝojas kune, optimismo regas en niaj rondoj. Ni ja ne faras niajn meblojn, konstruas niajn domojn laŭ aparta arkitektura stilo, sed ni havas nian propran kulturon, nian rimarkindan literaturon, niajn sociajn normojn. Kaj, kvankam ja ekzistas denaskaj esperantistoj kaj esperantistaj familioj, plejparte la Esperanto-movado dependas de varbado, de "konvertiĝoj". La malsukceso de la ŝakeroj kuŝis en tio, ke ili ne donis sufiĉan atenton al varbado, kaj la "varo", kiun ili prezentis al la mondo, ne allogis sufiĉe vastajn tavolojn de la homoj. Necesis tro multon fordoni, tro multon rezingi, por adaptiĝi al la strikta rego de la ŝakera fido. Rezulte, la movado mortis.

Kvankam nia ĉefa temo hodiaŭ ne estas la informado, mi ne povas ne rimarkigi, ke la striktigita vojo inter la ekstera publiko kaj la ŝakera mondo konsterne similis tiun de Esperanto. Ni ja ofte parolas pri tio, ke ni estas malfermaj al la ekstera mondo — sed la realo estas, ke por fariĝi ano de la Esperanto-movado necesas lerni tutan lingvon. Same kiel ĉe la ŝakeroj necesas akcepti certan fidon kaj renunci certajn karnajn dezirojn, kaj staras inter la publiko kaj la esperantismo tabelo de korelativoj, vortaro, gramatiko.

Kiel diaspora lingvo, kaj kiel dua lingvo, Esperanto apenaŭ havas siajn denaskajn parolantojn. Esperantistoj ne naskiĝas: ili estas "konvertitaj". Kaj fari homon esperantisto, tio estas unuavice instrui al tiu homo la lingvon. Por neniu alia lingvo la instruado estas tiel grava. Se ĉiuj instruistoj de la franca lingvo morgaŭ malaperus, la franca lingvo tamen eltenus. Se malaperus ĉiuj instruistoj de la angla, la angla pluvivus. Sed sen efika instruado — almenaŭ se instruado inkluzivas la kreadon de lerniloj — Esperanto ne estus vivipova. La rolo de la instruisto ĉe ni estas igi tiun malvastan kolon inter la ekstera publiko kaj akceptiĝo en la Esperanto-movado kiel eble plej larĝa, kiel eble plej facile trapasebla.

La instruisto de Esperanto estas do, se ne identa, almenaŭ parenca al la fakulo pri informado. Necesas allogi la publikon al la lernado. Se oni ne havas lernantojn, la plej bona metodiko restas fiaska. Bedaŭrinde, la informado pri Esperanto al la ekstera publiko estas tre mankohava. Kvankam ekzistas interesaj modeloj en kelkaj landoj, la informado estas plejparte sporada, mallongdaŭra, neplanita. Sekve la instruistoj de Esperanto ne povas atendi, ke la "informistoj" liveros al ili la lernantojn. Verdire, kelkaj el la plej sukcesaj informaj klopodoj estas senpere ligitaj al la instruado: la kampanjo «Esperanto Programita», kiun siatempe lanĉis s-ro Hermann Behrmann; la kampanjo Grupo Kvin en Britujo; la poŝta kurso en Britujo kaj Usono — por ne paroli pri la iamaj Ĉe-kursoj kaj la tuta aparato, kiu nomiĝis Andreo Cseh.

Verdire, ne eblas instrui kurson pri Esperanto — kurson, kiu ne nur prezentas la lingvon, sed ankaŭ ligas la lernantojn al la Esperanto-movado — sen bone koni siajn argumentojn, kaj sen bone koni la ecojn kaj avantaĝojn de ia Esperanto-mondo. Tiuj, kiuj formale, t.e. oficiale, instruas la lingvon, scias bone, ke la vojo al oficialigo de Esperanto en la lernejoj estas malfacila kaj kruta — kaj ke por sukcese laŭiri ĝin necesas politika sagaco, efikaj argumentoj, diplomata konduto, kaj trafaj publikaj rilatoj. Kiel elokvente atentigas Sonnabend en la enkonduka ĉapitro de sia libro pri la Lerneja Eksperimento, "instruistoj parolantaj Esperanton jam estas strangaj en la okuloj de siaj gekolegoj; ... ili ofte renkontas mokon aŭ antaŭjuĝojn." (p. 14)

Ĉio ĉi signifas, ke la instruistoj de Esperanto, aldone al tio, ke ili kreskigu al si iom dikan haŭton, nepre devas havi je sia dispono ĉiujn trafajn argumentojn. Ili devas kompreni la pretendojn de Esperanto kaj ilin defendi (kaj, finfine, reprodukti ilin). Ili devas kompreni la rilaton inter Esperanto kaj la fremdaj lingvoj, kaj inter Esperanto kaj internaciaj studoj. Ili ankaŭ devas esti bonaj pedagogoj, kapablaj gajni la respekton de siaj kolegoj.

Bedaŭrinde, ne sufiĉas rompi la barilojn kontraŭ Esperanto en la lernejoj, sed necesas ankaŭ daŭrigi. Tra la jaroj, eĉ grandaj sukcesoj ne mankis. Oni pensu nur pri la iamaj abundaj lernejaj kursoj pri Esperanto en Greklando, kie la simpla forteco de kelkaj personoj, precipe Anakreon Stamatiadis, alportis abundajn rezultojn — aŭ la iama impona programo de instruado en Manĉestro, kie la energio de unusola bone lokita homo, Norman Williams, instruigis Esperanton al centoj da lernantoj — aŭ la grandega iama programo de instruado en Jugoslavio — aŭ la kursoj en la elementaj lernejoj en Kalifornio — aŭ la agado de Vilkki en Somero, Finnlando. Spektaklaj rezultoj estas atingeblaj ankaŭ per lernejaj eksperimen-

toj, kiel klare montris Sonnabend kaj Frank kaj Lobin. Sed daŭrigi — jen problemo, kiu dependas ne de forteco de personecoj sed de bona organizado, forta retaro de kunlaborantoj, kaj la kreo de lokaj kondiĉoj daŭre akceptemaj. Ĉi-lasta siavice postulas la ekziston de internacia strategio por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kaj organiza aparato kapabla subteni kaj daŭrigi lokajn iniciatojn kaj plenumi tiun pli vastan internacian strategion.

Tiu ĉi ne estas loko aŭ okazo por proponi ankoraŭ plian strategion. Nur rakonti la historion de tiaj klopodoj tra preskaŭ cent jaroj povus okupi kelkajn horojn. La ŝlosila problemo estas tio, ke verki strategiojn estas facile, sed profunde analizi la fortojn je nia dispono kaj tajli la strategion por maksimume ekspluati tiujn fortojn estas multe malpli facile. Tamen, nenio en la Esperanto-movado estas pli grava.

La oficiala instruado de Esperanto ne estas la sola, aŭ eĉ la ĉefa, vojo al lernado de Esperanto. Eĉ relative malmultaj personoj, kiuj iam lernis Esperanton en lernejaj klasoj, efektive transiras al la aktiva Esperanto-movado. Plejparte la esperantistoj lernis la lingvon per unu el du vojoj, foje en kombino: unue, en neoficialaj kursoj; due per memlernado.

Nur pro tio, ke li aŭ ŝi iam lernis la Zamenhof-lingvon, ĉiu esperantisto opinias sin kapabla redakti gazeton, fariĝi Esperanto-poeto kaj konvinki la ĉefministron lerni Esperanton. Same, ĉiu esperantisto opinias sin kompetenta instruisto de la lingvo. La amatora instruado estas esenca elemento en la varbado por Esperanto; ĝi estas ankaŭ, bedaŭrinde, elemento en la malvarbado. Oni neniam malhelpos, ke amatoraj instruistoj instruu Esperanton: ja nur ia mislokita sindikatismo eĉ igus tion dezirinda. Precipe pro la malfacila vojo al oficialigo de Esperanto, ni bezonas niajn amatorajn kolegojn. Tamen, estas tre grave, ke la profesiaj instruistoj daŭre dediĉu sian atenton al instruado de tiuj amatoraj instruistoj. La profesiuloj havas gravan devon helpi siajn amatorajn kolegojn, plibonigi iliajn lertojn, kaj enkonduki ilin en la modernan metodikon de lingvoinstruado. Tro ofte niaj kursoj de Esperanto sekvas metodojn eksmodiĝintajn kaj malefikajn, uzas primitivajn materialojn, kaj estas monotonaj kaj senvariaj. Ĉar granda nombro da esperantistoj iel kaj iam elprovos la instruadon, ni celu, ke ĉiu kompetenta

esperantisto konu almenaŭ la fundamentojn de bona Esperanto-instruado. Devus okazi, ekzemple, multe pli da seminarioj pri instruado, specimenaj lecionoj kaj similaj aktivadoj en niaj naciaj kaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj.

Se niaj instruistoj ofte uzas primitivajn instrumaterialojn, tio povus esti ĉar ne ekzistas elekto, nome ke por la parolantoj de difinita lingvo la haveblaj lerniloj estas neadekvataj. Jen, bedaŭrinde, la reala cirkonstanco en multaj landoj. Kaj eĉ tie kie ili ekzistas, tiuj materialoj estas maloftaj: mankas variaj materialoj, taŭgaj por ĉiu cirkonstanco. La produktado de bonaj lerniloj estas kompreneble ne nur afero de la instruistoj: ĝi ankaŭ dependas de eldonaj eblecoj, de la ebleco efike merkatumi la lernilojn, de la ekzisto de publika postulo de bona materialo. Mia impreso tamen estas, ke malgraŭ multaj mankoj en nia eldona agado, ekzistas vojoj al publikigo de bonaj lerniloj, almenaŭ por la ĉefaj lingvoj, kaj ke la plej granda problemo kuŝas aŭ ĉe la verkado aŭ ĉe la komunikado inter verkanto kaj eldonisto. Tute alia demando estas kompreneble la amasa, komerca eldonado. Malmultaj el la grandaj serioj de lingvaj lernolibroj havas siajn Esperanto-volumojn, kaj klopodoj enigi Esperanton en tiujn seriojn ne alportis sukceson. Kie, tamen, ja venis sukceso (ekzemple en la brita serio *Teach Yourself* aŭ la franca serio *Assimil*), la rezultoj estis imponaj.

La lernolibra problemo estas por nia movado grandega. Devus ekzisti por ĉiu lingvo adekvataj lerniloj. Kvankam oni aperigis tra la jaroj Esperanto-lernolibrojn por sesdeko da lingvoj, multaj estis kompilitaj de personoj sen praktika aŭ teoria scio, laŭ neefikaj metodoj, aŭ sen tiu vere intima kompreno de la strukturo kaj karaktero de Esperanto, kiu estas nepre bezonata. Trakti Esperanton kvazaŭ ĝi estus simple ankoraŭ unu lingvo, tio estus perdi la unikaĵojn de la lingvo. Tiuj lernolibroj, kiuj ekspluatas la apartaĵojn de Esperanto, precipe en la vortfarado (kiel ekzemple tiuj de Auld), povas kapti la atenton de la lernanto multe pli efike.

Kvankam ILEI kaj UEA tra la jaroj faris sian eblon por altigi la nivelon de la lernolibroj, estas bezonata iom sistema kaj internacia aliro al tiu demando. Ne sufiĉas kontrolkomisionoj por konvinki aŭtorojn resti ortodoksaj (eĉ tia policumo de la merkato povas havi siajn negativajn efikojn). Necesas konsciigo de niaj lernolibraj

aŭtoroj pri metodiko kaj strategio. Kaj necesas kunordigita, internacia kampanjo, kun praktika helpo al la unuopaj landoj, por produkti taŭgajn librojn. La kontrolkomisiona aliro al la problemo ne liveras la necesajn instigilojn, sed eventuale nur bremsas la evoluon.

Sed la problemo estas ankoraŭ pli vasta. Se mankas por la plejparto de lingvoj adekvataj lernolibroj, eĉ pli malbona estas la situacio kiam temas pri aliaj lerniloj. Bonaj sonbendaj kursoj estas eĉ rarajoj en la Esperanto-movado, kaj plejparte mankas ankaŭ bonaj elparolaj bendoj kaj diskoj. Facilaj legolibroj komencas iom pli abunde aperi en la internacia merkato, kaj nun la revuo *Kontakto* helpas ŝtopi tiun breĉon, sed ankoraŭ mankas sufiĉa vario. Se temas pri vortaroj, la situacio lastatempe pliboniĝis, sed mankoj ankoraŭ abundas.

Oni atendus, ke parolantoj de Esperanto estus avangardaj utiligantoj de novaj metodoj de instruado, sed efektive regas severa konservativo en niaj rondoj. Pro tio, ne ekzistas ankoraŭ komerce aĉetebla komputila kurso pri Esperanto. La komputilon oni ankaŭ ne uzas, almenaŭ laŭ mia scio, por kompilado aŭ manipulado de komerce aĉeteblaj vortaroj — kvankam la lingvo Esperanto ŝajnus ideale taŭga por tiu speco de maŝinigo.

La problemo de lerniloj estas, do, parte problemo de verkado, parte problemo de efika organizado de la merkato. Kvankam niaj profesiaj Esperanto-instruistoj fariĝis en lastaj jaroj iom pli sentemaj pri la demando de metodiko, dank' al la laboro de homoj kiel Szerdahelyi kaj aliaj, tiu konsciiĝo ankoraŭ ne manifestiĝis sufiĉe en la efektivaj rezultoj. Mallonge dirite, do, la homoj lernas la lingvon ofte spite al la lerniloj kaj instruiloj.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Pro la kialoj jam menciitaj, la instruado de Esperanto estas ŝlosila elemento en la estonteco de nia movado. Konstatinte tion, oni supozus, ke atento al la instruado de Esperanto estus ĉie evidenta en la Esperanto-movado, kaj ke ĉiuj esperantistoj energie laborus por disvastigi la lingvon. Sed, kiel ni konstatis, la situacio ja ne estas tia. Same kiel la ŝakeroj, kiuj zorge formis siajn seĝojn, aŭ kantis, aŭ komponis, aŭ dancis, la Esperanto-movado ĝuas sian komunan ekziston sen sufiĉa atento al la ekstera mondo. Ni, kiuj plendas pri tiu lingva baro, kiu afliktas aliajn homojn, efektive kreas nian propran lingvan baron inter Esperantujo kaj la cetera mondo. Sekuraj en nia propra rondo, ni foje ne emas adaptiĝi al novalvenintoj, ne emas malfermi nin al la eksteraj fluoj.

Ekzistas en la Esperanto-movado ambiguaj, hezitaj sentoj pri la tuta demando de lernado kaj instruado de la lingvo. Ili situas iom profunde en nia grupa psiko. Kontraŭpezas la deziron instrui Esperanton al ĉiuj homoj el ĉiuj landoj unue la sento de komuneco, kiu ligas la esperantistojn. Ili sin konas interalie per siaj diferencoj disde la ekstera mondo, kaj la Esperanto-movado estas speco de azilo, eskapejo, for de la ĝenerala socio. Kio igas la Esperanto-kulturon kaj la Esperanto-socion alia ol la cetera mondo estas tio, ke oni devas trapasi diversajn obstaklojn por ĝin eniri, interalie lernadon de la lingvo. La Esperanto-movado, kun siaj delegitoj, sia Jarlibro, siaj gazetoj, siaj korelativoj, siaj vortludoj, siaj mallongigoj — ĉio ĉi ekzistas nur ĉar Esperanto ankoraŭ *ne* akceptiĝis, ankoraŭ *ne* fariĝis la dua lingvo por ĉiu. Ni ne subtaksu tiun elementon de apartigo en la sinteno de la esperantistoj.

Dua argumento, foje uzata kunlige kun la Universalaj Kongresoj kaj aliaj grandaj manifestacioj de la Esperanto-movado, estas tio, ke necesas montri al la ekstera mondo, ke ekzistas grupo da homoj plene kompetentaj pri Esperanto, kiu uzas ĝin same bone kiel ni ĉiuj uzas nian gepatran lingvon. Se, ekzemple, en Universala Kongreso ni havus amason da kursoj por komencantoj, aŭ en la revuo *Esperanto* ni havus paĝojn por komencantoj, la ekstera mondo ne traktus nin plene serioze, sed supozus, ke ni nur ludas per Esperanto, aŭ ke ĝi efektive ne estas plene matura kaj kompleta lingvo libere uzata de centmiloj da homoj tra la mondo. Tute sendepende de tio, ĉu oni aliĝas al tiu argumento aŭ ne (mi ne...), ĝi estas tamen indiko pri certa rezervo rilate la entuziasman kaj senbridan instruadon de Esperanto en ĉiuj medioj.

Kvankam mi bone komprenas la argumentojn de tiuj, kiuj deziras montri, ke Esperanto estas matura lingvo, kaj kiuj deziras pliprofundigi nian kulturon, ne nepre ĝin plivastigi, mi estas konvinkita, ke ni devas pli rekte fronti la neceson ĉiam kaj ĉie instrui Esperan-

ton se la okazo prezentiĝas. Estis epoko kiam la lokaj kluboj floris. Dum tiu epoko, ĉiu loka klubo havis siajn vesperajn kursojn, kaj la homoj entuziasme partoprenis en multaj lokoj. Kie eblas tiel daŭrigi, oni daŭrigu. Sed oni tamen agnosku, ke la mondo ŝanĝiĝas. Tiam oni lernis Esperanton en Plovdiv aŭ en Nantes aŭ en Palermo, ĉar oni ne havis okazon lerni aliajn fremdajn lingvojn kaj, sen tia lingvo, ne eblis vojaĝi. Hodiaŭ, kiam aviadiloj povas porti nin de Aŭstrio al Aŭstralio en kelkaj horoj, kaj eblas komunikiĝi inter Torino kaj Tokio telefone en kelkaj mikro-sekundoj, tiu kateniĝo al la loĝloko — kaj ankaŭ tiu subedukiĝo — esence malaperis, almenaŭ en la industriaj landoj. Ni devas nun kompreni, ke internacia turismo, aŭ vojaĝado ĝenerale, fariĝis bona areno por lerni Esperanton. Ni devas ankaŭ ekspluati ĝis maksimumo la amaskomunikilojn, ekzemple radion kaj televidon, por la instruado de Esperanto.

Unu konsekvenco de ĉio ĉi estas tio, ke en multaj landoj la lokaj grupoj stagnas aŭ malaperas. Ni plejparte ne eltrovis la ĝustan rolon por la lokaj grupoj en la moderna Esperanto-movado. Sed unu afero estas klara: meti sur ilin la solan aŭ eĉ la ĉefan respondecon por la instruado de Esperanto estus bela vojo al rapida elĉerpiĝo de la esperantismo. Mi mem restas konvinkita, ke ni devas ĉion fari por eviti kaj malaperigi tiun senton de ekskluzivo en la Esperanto-movado. Ni havu niajn apartajn valorojn, nian apartan kulturon, sed ni ne permesu, ke iu amo al la nuno malhelpu nin plani la estontecon. La ŝaḳeroj mortis ĉar ilia vivmaniero kaj ilia kredo estis tro malvastaj por fari kaj akcepti adekvatan nombron da konvertitoj. Ni zorge evitu similan fenomenon ĉe ni.

Estas interese, ke la landoj kie en nuna tempo Esperanto subite ekfloras — ekzemple Irano kaj Ĉinio — donas grandan kaj apartan emfazon ĝuste al la *lernado* de Esperanto. Kursoj abundas; instruistoj estas serĉataj. La homoj lernas Esperanton verŝajne precipe ĉar ĝi proponas al ili vojon al pli vasta mondo — ne pro la allogo de la Esperanto-movado kiel fermita kaj speciala rondo.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Ĉar mia temo estas la rolo de instruado en la Esperanto-movado, estus erare ne doni atenton al alia aspekto de la instruado: ne instruado de Esperanto, sed instruado pri Esperanto — kaj pri la multaj aliaj aferoj, kiujn efika esperantisto devus havi je sia dispono por efike funkcii en la movado kaj por disvastigi nian lingvon. La Esperanto-movado devus esti loko kie ĉiuj homoj lernas. Post la komenca kurso venas la perfektiga. Post la perfektiga tamen venas okazoj pli bone ellerni la lingvon, kaj plivastigi la terenon de spertoj en kiuj oni sentas sin ĉehejme en la lingvo. Venas ankaŭ, aŭ devus veni, okazo por studi pri la rolo de Esperanto inter la lingvoj de la mondo, por lerni pri la politika, socia, ekonomia kunteksto en kiu la esperantistoj laboras por disvastigi sian lingvon. Devus veni okazoj por plisubtiligi nian scion, plinuancigi ĝin — tiel ke ni povu distingi inter faktoj kaj opinioj, ni povu apartigi solidajn pretendojn disde fantaziaj arogoj en la argumentado por Esperanto. Devus veni okazoj por pli bone informiĝi pri nia propra literaturo kaj pri nia historio. Ankaŭ devus veni okazoj por lerni la metodojn de publikaj rilatoj, la lertojn de efika financado, la sekretojn de bona organizado kaj administrado. Kaj, kompreneble, devus veni okazoj por lerni kiel instrui nian lingvon. Niaj kongresoj kaj konferencoj devus esti abelujoj de klerigado, kaj ni mem, kiel esperantistoj, devus esti pretaj preni tiun klerigon kie ni povas, kaj porti al la Esperanto-movado la fruktojn de niaj spertoj.

Ekzistas jen kaj jen modeloj de tio, kio estas atingebla — en Pisanica en Bulgario, en Grésillon en Francio, en La Chaux-de-Fonds. Sed ĝenerale ni ne dediĉas sufiĉan atenton al la propra klerigado kaj ni nemature kritikas novajn iniciatojn. Per ĉi-lasta mi volas sugesti, ke la organiza metodo de la esperantistoj estas aŭ entuziasme laŭdi novan iniciaton aŭ planon eĉ kiam ili ne komprenas ĝin, aŭ detrue ataki ĝin, ofte senpripense. Relative malofte niaj homoj montras sufiĉan maturon por akcepti kaj doni kritikojn efike.

Estus kompreneble erare supozi, eĉ post tiel longa litanio de mankoj en nia movado, supozi ke ĉio negativas. Eĉ male. Nia malgranda movado estas miraklo: miraklo de homa interkompreniĝo, miraklo ankaŭ lingva kaj socia. Ni rajtas fieri pri niaj multaj atingoj — en la literaturo, en la vere rimarkinda ŝanĝo de starpunkto pri Esperanto inter seriozaj esploristoj, en la rapida disvastiĝo de nia

lingvo en diversaj mondopartoj. Indas fojfoje memorigi nin pri tiuj sukcesoj, se nur por malhelpi la deprimiĝon, la senton de frustriĝo, kiu povas formordi la animon de idealisma movado kiel la nia.

La Esperanto-movado montras iom forte la patologion de idealismaj movadoj: internaj kvereloj, reciprokaj akuzoj, denuncoj, la kreo de etoso de reciproka suspekto, de konspiroj, de kaŝitaj intencoj. Ni emas vestigi ĉion ĉi per moralaj principoj, sed vere niaj bataloj estas bataloj pri potenco aŭ pri persona malŝato — aŭ bataloj nur por batali, por eviti la eksteran realon. Movado, kiu daŭre remaĉas malnovajn kverelojn, daŭre redifinas sian pasintecon — tia movado perdas kontakton kun sia estonteco kaj kvazaŭ certigas, ke la sola estonteco, kiun ni spertos, estos nenia estonteco. Se entute ni volas sukcesigi nian lingvon, necesas kompreni, ke ni ankoraŭ ne sukcesis ĝenerale enkondukigi la lingvon ĉar ni ne sukcesis unuigi nian fortojn por atingi la sopiratan venkon.

En tiu rilato la instruistoj de Esperanto povas ludi aparte gravan rolon, ĉar ili estas tiuj, kiuj konstruas la ponton inter la ekstera publiko kaj la Esperanto-movado. Ilia sobra, energia kaj unueca aliro al la problemo de instruado kaj lernado de Esperanto povus montri vojon por ni ĉiuj. Kion ni povas fari por doni al la instruado kaj al la Esperanto-instruistoj la rolon, kiun ili devus havi en nia movado?

Unue, necesas ĝenerala turnado de nia movado eksteren, al la ĝenerala publiko. Ni devas pli ofte komunikiĝi kun tiu publiko, kaj pli sisteme varbi personojn, kiuj estas pretaj lerni Esperanton. Ni devas malfermi niajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive la Universalan Kongreson, por fari el ili lernejojn de Esperanto, kun kursoj je ĉiuj niveloj, seminarioj, perfektigaj rondoj. Ni devas malfermi niajn rondojn laŭ taŭgaj manieroj al tiuj, kiuj deziras iam lerni Esperanton, ne nur al tiuj, kiuj jam lernis ĝin. Ni devas esti pretaj montri nian movadon al eksterstarantoj kaj adapti ĝin al iliaj bezonoj.

Due, ni devas evoluigi bonajn lernilojn — ne nur librojn, sed ankaŭ bendojn, komputilajn molaĵojn ktp. Kio mankas ĉi tie estas efika kunordigado kaj la kreo de strukturo, kiu instigas al verkado kaj produktado de lerniloj — kaj ilia vendado. Ankaŭ necesas evoluigi niajn argumentojn, por kapti la lernantojn kaj por konvinki la

ĝeneralan publikon.

Trie, necesas paralela instigo al konstanta lernado *ene de* la movado, por formi bonajn lokajn gvidantojn, por altigi la scion de la esperantistoj ĝenerale, kaj por altigi la nivelon de instruado de la lingvo. La Esperanto-movado ne estas ia ludejo, kiu ekzistas nur por ke oni ĝuu ĝin: ĝi estas forĝejo de nova socia ordo, de nova normo de homaj rilatoj je internacia skalo; kaj lerni la lingvon estas nur preni sur sin novajn respondecojn, ne liberiĝi de ia ĝeno.

Kvare, necesas pli bona integriĝo de la instruista ligo kun la ĝenerala movado. Se oni rigardas al la historio de ILEI, oni vidas, ke temas pri historio jen de intima kunlaboro jen de ioma distanciĝo, kaj tiuj starpunktoj alternis tra la jaroj — depende de tio ĉu oni unuavice timis englutiĝon en la ĝeneralan movadon, ĉu oni unuavice deziris preni sur sin apartan aŭ ekskluzivan respondecon pri la eduka flanko de la movado. UEA nepre bezonas fortan ILEI, kaj ILEI bezonas fortan UEA. Pro tio, nepre necesas starigi kaj konservi maturan rilaton inter la du organizoj, en kiu ILEI, en kunlaboro kun UEA, tenas ĉefan respondecon pri la instruado kaj lernado de Esperanto, kaj UEA faras sian eblon subteni kaj apogi ILEI. Vero estas, ke UEA bezonas la instruistojn pli ol UEA mem komprenas. La vidpunkto, ke UEA estas iel tro matura aŭ tro integriĝinta por ke ĝi povu doni atenton al la instruado de Esperanto, estas absurda. Same absurda estas la vidpunkto, ke iel ILEI ekskluzive respondecu pri tiu ĉi tereno. Ideale, devus ekesti aktiva kunlaboro inter memstara ILEI kaj la tegmenta UEA — kaj ni ne permesu al ni forlogiĝi de superfluaj kaj troblovitaj ideologiaj argumentoj, kiuj ne rilatas al la neceso krei kaj teni novajn esperantistojn.

Persone mi opinias, ke ni devas meti en unuan lokon por la dua jarcento de Esperanto la instruadon kaj lernadon de la lingvo. Ni konsciu, ke ni estas, kaj devas resti, amasmovado, kaj ke spirito de eliteco kaj ekskluziveco havas nenian lokon en niaj rondoj. La alternativo estas morti kiel mortis la ŝakeroj, postlasante kelkajn belaĵojn, kelkajn kontribuojn al la kulturo, fariĝante temo por muzeoj, ne kuriero de nova socia kaj kultura ordo.

English "yes" – Esperanto "jes" Lingvoj kiel partneroj

Helmut Sonnabend

(parolado okaze de la inaŭguro de la 19-a Konferenco de ILEI)

Kiam mi elektis la temon por la inaŭguro de tiu ĉi konferenco en Svedujo — English "yes", Esperanto "jes"; lingvoj kiel partneroj — mi faris tion unuflanke pro la firma prefero por la angla lingvo en la nordaj ŝtatoj, sed aliflanke mi ankaŭ komparis mian ideon kun tre malnova rakontaĵo el la biblio: la juna Davido venkis pri Goljato. Esperanto venki kontraŭ la angla lingvo? Tion ni povas forgesi. Tamen kelkaj nelacigeblaj fantaziuloj konstante kredas, ke oni povas fronte ataki tian enradikiĝintan lingvon. Jam la vorto "partnero" estas stranga.

Eble vi konas la ŝercon, kiam museto diris al elefanto: ni ambaŭ kune estas fortaj, ĉu ne? Partnereco havas sencon nur inter samfortuloj! Nun, ni esploru iom, ĉu ambaŭ lingvoj tamen povus profiti unu de la alia!

Kelkajn faktojn ni konsideru:

1. La angla lingvo estas gepatra lingvo de 305 milionoj da homoj kaj por 105 milionoj dua lingvo.
2. Esperanto estas nenies gepatra lingvo, sed dua lingvo inter 10 ĝis 12 milionoj en Eŭropo kaj priatentinda nombro ekster Eŭropo (laŭ la lingvisto Décsy).
3. Scienco kaj teknologio estas sen vasta uzado de la angla lingvo ne imageblaj.
4. Esperanto komencas kolekti kelkajn meritojn sur tiuj ĉi kampoj.
5. La angla lingvo estas en ĉies cerbo sufiĉe konata objekto, pri ĝia lingveco neniu dubas.

6. Male, rilate Esperanton regas en multegaj cerboj nebulaj imagoj.
7. Ne estas problemo instrui la anglan lingvon en niaj lernejoj.
8. Esperanto, se hazarde instruata en lernejoj, gvidas nur la vivon de iu "mura floreto".

Ne tuŝita de ia ajn skrupulo la internacia konferenco de ILEI en Skofja Loka 1984 rekomendis kaj sugestis konsideri kaj pridiskuti nian proponon pri modifo de la fremdlingva instruado:

> Enkonduki Esperanton kiel bazan lingvon; eklernado de fremdaj lingvoj je komenco de la kvina lerneja jaro; la fremdlingva instruado estu akompanata de Esperanto kiel kompletiga lingvo; la studado de Esperanto por studentoj kaj instruistoj en universitatoj estu tute normala ebleco; Esperanto restu tiam la unusola lingvo, kiam aliaj por gelernantoj ial ne estas bezonataj.

Tiuj ĉi principoj estas nun por ILEI la netuŝeblaj bazaj celoj ĝis ili estos akiritaj kaj atingitaj!

Ni bone konas la rezervojn rilate Esperanton. Por niaj lernejaj instancoj, plene dependaj de la tuta politika ĝenerala situacio, estas Esperanto nenia temo, kvankam ili ne protestas, se kelkaj fervoraj instruistoj en libervolaj laborrondoj instruas al kelkaj gelernantoj Esperanton.

Resume, ni ne atendu de niaj instru-instancoj efikan apogon aŭ eĉ rekonon. Ne ĉiam estas la fama breto antaŭ la kapo, sed ne malofte ludas seriozaj duboj certan rolon: artefarita lingvo aŭ planlingvo signifas hurdon, trans kiu ili timas salti kiel ĉevalo.

Por ŝanĝi la kapojn, ni ne ŝanĝu la politikistojn sed la ĝeneralan politikon. Sed tio ne estas tasko de instruistoj, sed tasko de ĉiuj Esperantistoj.

Kaj estas ne hazardo, se oficialaj instancoj de ĉia koloro enordigas Esperanton inter suspektaj aliaj artefaritaj aŭ planlingvoj. Kaj ni trompus nin mem, se ni enordigus la eventon de Montevideo 1954 kiel eternan venkon de Esperanto. Ripozi sur tiu ĉi valora tapiŝo ne progresigas nian aferon. En la sino de UNESKO estas la du esperantistaj organizaĵoj nur inter multaj ceteraj.

Tuj post la konferenco en Skofja Loka ni enketis en kelkaj landoj — ankaŭ en Svedio — pri la instru-organizitaj sistemoj. Ĝenerale

montriĝis ke en la horara plano de la lernejoj restas tempo por oficiale instrui Esperanton — nur per rezigno pri aliaj fakoj. Efektive la horara plano en unu sveda komunumo donas ekzakte la eblecon instrui Esperanton en elementa lernejo sen perdo de la substanco. Tamen, entute mi konstatis, ke malpli organizaj demandoj malhelpas pli ol la manko de vera kompreno pri la signifo, valoro, tasko kaj efikeco de Esperanto.

Lingvo, elpensita de unu homo, kiu estis profesie nur okulkuracisto, ne impresas al scienca lingvistiko. La eŭropaj kulturministroj estas inter si unuanimaj: Esperanto ne estas temo, se la interlingva problemaro okupas la ministrojn. Plurlingveco estas nuntempe la ovo de Kolumbo, sed laŭ mi ĝi ankaŭ estas konfeso ke ili ne scias kiamaniere solvi la ĝeneralan interkompreniĝadon en Eŭropo. La disŝireco de la eŭropa unuig-evoluo malkaŝiĝas en la lingva demando. Ĉiam oni substrekas la samrajtecon de ĉiu lingvo, eble ankaŭ la samvalorecon, sed pri ties samsignifeco oni ne parolas. Se ankaŭ Unesko eldonas siajn dokumentojn en franca kaj angla lingvoj — nuntempe mi ricevas la dokumentojn ĉefe en franca lingvo — eble la respondo al la retiriĝo de Usono kaj hezitemo de la Angloj; se ankaŭ ĉiu delegito en Eŭropa Parlamento aŭdas sian lingvon per aŭdiloj, montriĝas ke iom-post-iom evoluas kortuma etiketo. Oni parolas france kaj/aŭ angle. Dokumentoj, protokoloj, skizaj proponoj estas kutime antaŭmetitaj aŭ en franca aŭ en angla lingvo. Ĉiuj aliaj samrajtaj lingvanoj suferas prokraston ĝis finfine (eble) ĉio estos je la dispono en ilia hejma lingvo.

Estas konate, ke la germana federacia kanciliero, d-ro Kohl, ne parolas fremdajn lingvojn. En la eŭropa konsilantaro d-ro Kohl energie protestis kontraŭ lingvajn manipuladojn en kiuj eĉ la germana lingvo estas neglektata. Kohl instrukciis siajn ministrojn, senditojn, kompetentulojn nur paroli germane, skribi germane, kaj akcepti nur germanlingvajn oficialajn skribaĵojn — ĉiam, tuj kaj ne poste. Alikaze ili estas avizitaj obstine ne reagi.

La neceso enkonduki komunan eŭropan duan lingvon (angle: European Second Language) jam pli longe estas rekonita. Lokaj aŭ regionaj dulingveco, plurlingveco, tradukistaro, kvankam lingvopolitike valoraj, ne povas funkcie anstataŭi komunan duan lingvon. En la pasintaj dudek jaroj ekestis en Eŭropo tute nova dulingvostrukturo: proksimume 270 milionoj da homoj en la orienta parto

de Eŭropo uzas precipe la rusan lingvon, 360 milionoj en okcidento precipe la anglan, sed estas rimarkinde, ke en orienta Eŭropo la inteligenteca tavolo uzas la anglan lingvon. Ne estas dubo do, ke la angla lingvo disponas pri la plej grandaj ŝancoj fariĝi la Eŭropa Komuna Dua Lingvo.

Kiel jam antaŭe dirite, ankoraŭ pro interpolitikaj kaŭzoj parlamentanoj, politikistoj, ministroj kaj pedagogoj, interpretistoj, komercaj entreprenistoj emfazas — se ankaŭ pro plej malsamaj kaŭzoj — la plurlingvecon, laŭ la moto "enkapigu tiom, kiom vi nur povas"!

«Kiujn el tiuj ĉi 16 lingvoj vi deziras en 1985 libere paroli?»

Tiun ŝi anoncon vi trovas en *Reader's Digest*, eldonita en 17 lingvoj. Sen granda problemo vi povos lerni tute agrable kaj komforte en via hejmo: la anglan, francan, italan, hispanan (kastilan), usonan, araban, germanan, japanan, grekan, nederlandan, norvegan, portugalan, rusan, svedan, serbokroatan, hispanan (sudamerikan). Konataj estas kelkaj talentaj lingvemuloj, kapablaj lerni ĉiujn ĵus nomitajn. Kutime mi aldonas ĉi-loke ekzemplon kaj nomas Henriko Schliemann, la elfosinton de Trojo. Li lernis kaj regis 40 lingvojn.

Nur, plurlingveco neniam solvos la lingvan problemon en Eŭropo. Unuiĝinta Eŭropo devas ankaŭ lingve formi spiritan unuecon. La ekzemploj de Usono kaj Ĉinio pruvas, ke sen unueca lingvo oni ne povas organizi kaj teni grandpotencon. La "ĉiu-lingvo" malhelpas ĉian evoluon kaj progreson. La fabelo de la konstruado de babela turo estas tipa ekzemplo. La lernado de fremdaj lingvoj alportos ĝenerale nur intelektan kontentigon por la lernanto mem. La homa socio ne multe profitos de tio.

La homa socio havas ja sufiĉe da pli urĝaj taskoj:
- zorgi pri nutraĵo por ĉiuj;
- forigi la senlaborecon;
- sanigi sian ekologian medion;
- batali kontraŭ malsanoj;
- taskoj sennombraj kiuj ne permesas la lukson malŝpari limigitan vivotempon.

La lernita lingvo donas al ni nur la konon de la lingvo. Novan scion pri la mondo per ĝi ni ankoraŭ ne akiros. Niaj urĝaj komunaj taskoj

ne bezonas por siaj solvoj multlingvecon, sed tre necese komunan lingvon. Do, *Komuna-Eŭropa-Dua-Lingvo* estas urĝe bezonata kaj utila.

Ĉu ni pro la realeco povas akcepti la anglan lingvon? Ekzistas multe da kaŭzoj por jese respondi:

- la nombro de la parolantoj kaj uzantoj;
- la kolektita scio en ĝi;
- la prezento en lernejoj kaj universitatoj;
- la armeo da instruistoj;
- la instrua ekipo en la formo de modernaj instruiloj;
- la konstanta pliigo de anglaj vortoj en naciaj lingvoj.

Ĉu nun estus por la angla lingvo granda avantaĝo fariĝi la Komuna Eŭropa Dua Lingvo?

La evoluado de kreolaj lingvoj estas konata kaj interesa. Kreoliĝado de iu lingvo ekestis ĉiam tie, kie altevoluintaj eŭropaj lingvoj kaj lingvoj de indiĝenoj tuŝiĝis. El la kunfandiĝo ekestis komplete novaj lingvoj kun propra simpla gramatiko, kvankam la deveno restas konstatebla. La "piĝiniĝado" estas ĝia antaŭŝtupo. Piĝino estas pli bone konata ĉe ni kiel *piĝin-angla*.

Ĉu piĝiniĝado inter eŭropaj kulturlingvoj same eblas?

La elirsituacio estas alia. Jen superas unu grandlingvo vicon da aliaj grandlingvoj. Piĝino estas interliga lingvo kaj estas uzata por nete praktikaj celoj. Ĝi nur disponas pri tre malgranda vorttrezoro, stumbla gramatiko kun draste redukitaj deklinacioj. La klasika piĝino estiĝas inter homoj, kiuj ne parolas la lingvon de la alia. Polo kaj Finno, lerninte iom la germanan lingvon, senĝene interŝanĝas pensojn miksitajn kun multaj lingvaj eraroj tute liberaj sen granda streĉo. La situacio tute aliiĝas, se unu parolas kun germano. Abrupte ĉesas la senĝeneco.

Kutime homoj, kies lingvoj estas malbone regataj, adaptas sian lingvon al la nivelo de sia partnero, serĉante kaj aplikante simplajn formojn. Ili piĝinigos sian lingvon. Tiu kompleza instinkto implicas lingvan fatalon por la estonteco de Komuna Eŭropa Dua Lingvo. Almenaŭ 80 % de la Eŭropanoj devus lerni ĝin. Ĉu la piĝiniĝado estas evitebla? Simpla neado certe ne estus la ĝusta respondo.

La evoluado de la komuna dua lingvo jam en malmultaj jardekoj

malligiĝus de sia origino kaj komencus sendependan vivon. El la german/angla, sved/angla, franc/angla, ital/angla, dan/angla ktp., kombine kun la tuteŭropa aplikado ekestus "Nova Eŭropa Lingvo". Probable la angla lingvo estus iamaniere ĉiam ekkonebla, sed en kia koruptita formo! Do, al kiu la gepatra lingvo estas kara, tiu ne klopodu, ke lia lingvo fariĝu Komuna Eŭropa Dua Lingvo.

En sia libro *Die linguistische Struktur Europas*, Gyula Décsy nomas ses lingvojn — kompreneble kun pluraj rezervoj, ĉar ideala komuna lingvo ne ekzistas — kiuj plenumus plurajn kondiĉojn kiel komuna lingvo. Li nomas la vicordon laŭ alordigitaj mezur-poentoj:

Angla lingvo	30 poentoj
Esperanto	26 poentoj
Latina lingvo	26 poentoj
Germana lingvo	21 poentoj
Rusa lingvo	20 poentoj
Franca lingvo	18 poentoj

Esperanto kiel dua kandidato apud la angla!

Partneroj? La angla lingvo bezonas partneran lingvon, kiu transprenu pli kaj pli da taskoj. Mi citas Décsy: "Esperanto estas nebela, sed tre utila, netruebla kaj duktila kiel kaŭĉuko." Kiel taksis Zamenhof sian lingvon? Kio estis por li la estonteco? Li diris:

> "Pli aŭ malpli frue lingvo internacia estos enkondukita. La estonteco apartenas al ni. Ni supozu eĉ, ke tiu formo de lingvo internacia, por kiu ni batalas, montriĝos en la estonteco kiel erara kaj ke venonta lingvo internacia estos ne tiu, kiun ni elektis — sed tio ĉi ja tute nin ne devas konfuzi, ĉar ni batalas ne pro la *formo*, sed pro la *ideo*, kaj formon konkretan al nia batalado ni donis nur tial, ke ĉia batalado abstrakta kaj teoria ordinare al nenio kondukas. Se tiu ĉi formo montriĝos erara, ni morgaŭ ĝin ŝanĝos, kaj en okazo de bezono ni ĝin post-morgaŭ ankoraŭ unu fojon ŝanĝos, sed ni batalados pro nia ideo tiel longe, ĝis ĝi pli aŭ malpli frue estos plene efektivigita!
>
> Sed restas la demandoj: kiam kaj kiamaniere ĝi venos? kaj ĉu oni povas antaŭvidi kia lingvo estos internacia? Inter la unua demando kaj la lasta ekzistas la sekvanta malvasta ligiteco: se oni ne povas antaŭvidi, kia lingvo estos farita internacia, kaj

se diversaj lingvoj havas pro tio ĉi pli-malpli egalajn ŝancojn, tiam oni devas atendi ĝis la registaroj de ĉiuj (almenaŭ la plej gravaj) regnoj decidos aranĝi por tiu ĉi celo kongreson kaj decidi la demandon pri lingvo internacia:
1) aŭ elekti ian el la ekzistantaj lingvoj vivantaj; 2) aŭ elekti ian el la lingvoj mortintaj (ekzemple latinan, grekan, hebrean); 3) aŭ elekti ian el la ekzistantaj lingvoj artaj; 4) aŭ difini komitaton, kiu okupus sin je la kreado de lingvo tute nova."

Permesu eble iajn moketajn rimarkigojn. Ofte mi renkontis (kaj renkontas) samideanojn kiuj estas pli esperantistaj ol Zamenhof mem, aŭ male homojn en tre altaj funkcioj aŭ postenoj kun kvalitogrado: ili ĉiam havas respondojn por ĉiuj problemoj! Ili kompreneble nur rikane rigardas Esperanton kaj nin kiel ian efemeran historian eventon, kies tempo estas pasinta. Sed tio ne gravas!

Interese ja estas, ke Zamenhof ne pensis en mallarĝaj, intelektaj dimensioj! Lia firma kredo, kaj lia per nenio skuebla konvinko estis, ke la homaro bezonas Lingvon Internacian. Ĝi alportos al la mondo grandan utilon. Esperanto pruviĝis kiel la *modelo de vivanta Lingvo Internacia!* Tamen, li metis Esperanton ĉiam denove je la dispono kaj rezonis en kvar punktoj:

- aŭ elekti iun el la ekzistantaj lingvoj (nuntempe nur povas esti la angla lingvo);
- aŭ elekti iun el la lingvoj mortintaj (kaj kiel Décsy li nomis la latinan);
- aŭ elekti artefaritan lingvon (kaj logike li pensis pri Esperanto kiel ankaŭ Décsy);
- aŭ kreadi tute novan lingvon.

Nun, kiu iom serioze okupiĝis pri Esperanto, tiu facile konstatas, ke tiu ĉi lingvo montriĝis dum sia centjara ekzisto mirinde freŝa kaj stabila. Ĉar Esperanto estas nur 'artefarita' lingvo, sed tre vigle vivanta, ĝi povas esti — kaj ja nur ĝi! — la sincera partnero de la angla lingvo. Lingvo de ne granda popolo, kiu jam tiel profunde kaj multe servis al la homaro, kiu ŝuldas al ĝi dankon! Sed kiu same multe suferis pro la multa misuzo. La angla meritas nun indulgon por purigi sin mem, retiriĝi de la lingva merkato kaj ne plu esti ĉies publikulino.

Esperanto, laŭ sia robusta strukturo, kapablas savi la anglan lingvon kaj redoni al ĝi la memestimon...

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Je la fino de mia temo mi konkludas per jenaj punktoj:

1. Komuna Eŭropa Dua Lingvo estas urĝe bezonata kaj ne povas esti anstataŭigita per plurlingveco.
2. La plej taŭgaj por tiu celo estas aŭ la jam fakte vaste uzata angla lingvo, aŭ alternative artefarita lingvo. Kaj malgraŭ la obstinaj ignorantoj kaj mokantoj: la Lingvo Internacia Esperanto. Ambaŭ lingvoj estu samrajtaj; Esperanto kiel baza lingvo kaj kiel tia instruata en lernejoj.
3. Esperanto simpligu la tradukadon kaj interpretadon de anglalingvaj dokumentoj. Ili estus prezentitaj nur en Esperanto. Esperantlingvaj dokumentoj estu inverse tradukitaj en la anglan lingvon.
4. Konferencoj, asembleoj pli kaj pli uzu la avantaĝojn de Esperanto.
5. Esperanto evoluu iom post iom al sola Komuna Eŭropa Dua Lingvo, kaj ebligu tiel la identecon de la valora angla lingvo. Ĝi cetere eltenos pli bone ĉian proceduron, ĉar ĝi ja estas "duktila kiel kaŭĉuko".

Kion bezonas la sciencistoj: la lingvon «Esperanto», aŭ la kodon «Internacia Lingvo»?

Bernard Golden

"La Internacia Lingvo al la sciencistoj, la *tutan* Esperanto al la esperantistoj!" Per tiu retorikaĵo d-ro Helmar G. Frank resumis la asertojn, kiujn li faris pri la nomo de la planlingvo de d-ro Zamenhof, en sia inaŭgura parolado ĉe la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) en Sanmarino, en decembro 1983. D-ro Frank argumentis, ke sciencistoj bezonas nur novan kodon por interkompreniĝo; kiel sciencistoj ili ne bezonas la kulturajn valorojn kaj la historian tradicion de Esperanto. Nu, Frank menciis nur sciencistojn, sed en la pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ en certaj socipolitikaj medioj regas la nocio, ke por ĉiuj Esperanto devas esti nur ilo, speco de komunika rimedo kiel la telefono aŭ radio.

Ankaŭ en la tempo de. Zamenhof estis homoj, kiuj elbuŝigis la saman rekantaĵon:

Oni bezonas nur la lingvon,
For la mucidan tradicion!

La aŭtoro de Esperanto respondis al tiu sinteno en inaŭgura parolado multe pli leginda kaj legenda ol tiu de d-ro Frank en Sanmarino. La jaro estis 1906, la loko Ĝenevo, kie okazis la Dua Universala Kongreso de Esperanto. Tiel grava estis la demando pri la signifo de la esperantismo tiutempe, ke Zamenhof detale pritraktis tiun temon en sia prelego. Difinante la esperantistojn, Zamenhof priskribis du polusajn tipojn: tiuj, kiuj, akceptinte la internan ideon, "revas unuigi per Esperanto la homaron" kaj ankaŭ tiuj, kiuj "uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj". Li deklaris plue, ke la idealisma flanko de la esperantismo ne estas deviga. Ĝis

tiu punkto ne estas konflikto inter Zamenhof kaj Frank, ĉar ankaŭ tiu ĉi kaj liaj sciencaj kolegoj, uzantoj de Esperanto por puraj praktikaj celoj, ja apartenas al la esperantistaro malgraŭ tio, ke ili ne deziras esti tiel nomataj. Kiel privataj personoj, interkompreniĝantaj per la Esperanta kodo, ili rajtas rifuzi, agnoski aŭ apogi la revojn, esperojn kaj agojn de aliaj esperantistoj. Tamen, paradokse, la Esperanto-movado ne ignoros ilin, kaj vole-nevole ili fariĝos partoprenantoj — eĉ se nur periferiaj — en la tradicio.

Bedaŭrinde la afero ne povas tiel resti, ĉar d-ro Frank postulas, ke la Esperanto-movado ne plu uzu la lingvonomon "Esperanto", precipe propagandacele inter sciencistoj. Anstataŭe, li proponas, ke oni parolu pri "Internacia Lingvo". Frank bazas sian rezonadon sur la opinio, ke la origina nomo de la lingvo de Zamenhof estas "Internacia Lingvo", dum "Esperanto" estas nur kromnomo. Pri tio Frank eraras. Trakribrado de la verkoj de Zamenhof indikas, ke "lingvo internacia" estis nur unu el la nomoj, kiujn la aŭtoro de Esperanto uzis. La titoloj de liaj unuaj praesperantaj projektoj estis "lingvo universala"; poste li uzis la esprimon "lingvo internacia". Ekde 1889 estis aldonita al "lingvo internacia" la vorto "Esperanto" kiel lingvonomo, kaj finfine ĝi sola restis. El tio ĉi estas tirebla la konkludo, ke Zamenhof mem akceptis la nomon Esperanto por sia lingvo kaj uzis ĝin *anstataŭ* "lingvo internacia". La nomo "Esperanto" funkcias do same kiel fabrikmarko. Kvankam aliaj planlingvistoj povas nomi sian lingvon internacia lingvo, imitaĵoj de Esperanto devas esti alimaniere nomataj, ekzemple Esperantido, Nov-Esperanto, k.s. "Internacia Lingvo" ne konvenis kiel nomo de specifa planlingvo, ĉar ĝia signifo estas tro ĝenerala. Estis, estas kaj estos pluraj internaciaj lingvoj. Laŭ la ĝisnunaj nestriktaj difinoj, internacia lingvo povas esti etnolingvo aŭ planlingvo, lingvo vaste uzata tra la mondo, sed ne oficiale, aŭ oficiala lingvo uzata inter nacioj sed ne vaste. La termino, do, povas signifi ĉion al ĉiu.

Frank marteladas la punkton, ke la nomo Esperanto ne taŭgas por sciencistoj, ĉar ĝi signifas "ne nur la neŭtralan kodon, sed ankaŭ la kulturajn valorojn, la literaturon, la movadon, la tradicion". Laŭ lia interpreto «Internacia Lingvo» signifas "nur la lingvon mem, la science utilan kodon". Pro tio Frank postulas, ke esperantistoj evitu la uzon de la nomo Esperanto "en ĉiuj oficialaj tekstoj kaj gazetarinformoj rilate AIS", kaj li insistas, ke oni uzu (kvazaŭ eŭfe-

mismo!) "Internacia Lingvo ... eventuale mallongigite kiel I.L. aŭ ILo".

D-ro Frank kuraĝas peti tiun kompromison flanke de la Esperanto-movado; li eĉ retorike nomas ĝin "historia kompromiso"! Miaopinie, se la esperantistaro akceptas tiun proponon uzi nur la karaktermankan nomon Internacia Lingvo aŭ la nudajn kriptaĵojn IL kaj ILo (eĉ se nur en limigitaj rondoj de sciencistoj kaj alispecaj 'praktikaj' homoj) tio signifus ne kompromison sed kompromiton por la movado. Oni ne forgesu, ke malgraŭ la furora propagando pri la Akademio Internacia de Sciencoj, ĝi ankoraŭ estas nur surpapera afero. Cetere, estas substrekite en la fina rezolucio de la Iniciatgrupo de AIS, ke Esperanto "nur servas kiel unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de AIS". Laŭ mia scio neniu alia organizaĵo aŭ konferenco ĝis nun malfermis la pordon al Esperanto nur kondiĉe, ke ĝi ŝanĝu sian nomon por povi funkcii kiel oficiala aŭ labora lingvo. Kial, do, la esperantistoj nun klinu sin antaŭ Frank kaj la AIS-anoj?

Kiel recenzi lernolibron?

Bernard Golden

Kiu estas la plej subevoluinta ĝenro de la Esperanta literaturo? Unu diras, ke estas la poezio, alia mencias la romanon, tria trovas stagna la dramaturgion. Mi opinias, ke ĉe la nadiro* kuŝas la literatura kritikado kaj recenzado. En Esperantujo ne estas recenzistoj — nur recenzantoj karakterizitaj per diversaj gradoj de diletanteco. Kiu ne kredas tion, komparu recenzojn en la plej elstaraj etnolingvaj beletraj revuoj kun tiuj aperantaj en Esperantaj periodaĵoj. Kelkfoje estas neeble diferencigi recenzojn disde eldonejaj reklamoj. Tiaj recenzoj estas plenaj de malplenaj vortoj dirantaj nenion pri la kvalito de la koncerna verko. Ofte la sola originala kontribuaĵo de recenzanto estas unu-du frazoj pri la kvalito de la papero kaj tipografio kaj eble plendo pri la prezo.

Ĉu ekzistas objektivaj kriterioj por recenzado? Kiuj estas la mezuriloj kaj normoj por pritrakti verkon en Esperanto? En la fruaj jaroj de nia lingvo, ĉio verda estis bona. Ĉu tio validas ankaŭ hodiaŭ? Ĉu oni komparu Esperantan verkon nur kun aliaj verkoj en Esperanto aŭ ankaŭ kun samtemaj publikigaĵoj en aliaj lingvoj? Ĉu recenzanto de tradukita verko nepre legu ankaŭ la originalon, antaŭ ol li laŭde priskribas tion kiel "bonega tradukaĵo"? Fine venas la plej tikla demando: ĉu recenzonto estu devigata legi libron, kiun li akceptas por recenzado?

En tiu ĉi eseo mi ne provos respondi ĉiujn ĉi-suprajn demandojn. Mia celo estas analizi du recenzojn de antaŭ nelonge eldonita verko. Temas pri itallingva lernolibro de Esperanto titolita *Esperanto – corso di base*, kies aŭtoroj estas Renato Corsetti, Mauro La Torre kaj Nino Vessella. Anonima recenzo troviĝas en *La Kancerkliniko* (32, 1984, p. 18); kaj en *Heroldo de Esperanto* (1984, n-ro 14/1737, p. 4) aperis la recenzo de Leo Pecchieri. La peco en LKK estas tipa ekzemplo de neniodira priskribo. Ĉekape mankas la

eldonloko kaj la prezo de la verko; male la recenzinto informas pri ĝia dikeco kaj manipulebleco! "Plie la libro belaspektas". Jes ja, sed pli grava estas ne ĝia estetika sed ĝia didaktika kvalito. Pli ol duono de la recenzo resumas la temojn de la tekstoj. Tio estas ĉio — kaj nenio!

Pli ampleksa estas la recenzo en *Heroldo*, preskaŭ tutan kolumnon longa, kun ilustraĵo pri la kovrilo, plenaj bibliografiaj indikoj kaj ankaŭ la prezo. En la unua alineo la recenzanto substrekas, ke du pozitivaj punktoj de la verko estas la enkonduka lingvistika analizo fare de universitata profesoro kaj la nova kaj moderna metodiko. Tiu ĉi estas tre resume priskribita en la sekva alineo. La libro konsistas el tekstoj, tradukoj en la itala, klarigoj kaj ekzercoj. Pro evito de gramatikaj fakesprimoj, la lernilo estas uzebla fare de nekleraj lernontoj. Poste tiu ĉi recenzo fariĝas laŭenhave paralelaĵo de tiu en LKK. Preskaŭ tri-kvaronoj de la tuto estas dediĉita al mallaŭda pritrakto de la enhavo de tekstoj temantaj pri maldekstraj politikaĵoj. La recenzo, do, estas malfavora, ĉar estiĝas timo, ke disvastigo de tia lernolibro, al kiu mankas neŭtraleco, povas kompromiti Esperanton.

La recenzinto en LKK favoras la lernolibron ĉefe pro la tekstoj, sed li ne donas sufiĉe da informoj por povi taksi la verkon laŭ pedagogia vidpunkto. La dua recenzo kondamnas tiun lernilon ĝuste pro ties tendenca enhavo, sed ankaŭ en ĝi mankas analizo de la metodologio, sur kiu baziĝas la instruado. Estas necese ricevi informojn pri la sekvaj punktoj. Al kiu estas destinita la lernolibro? Evidente ĝi estas uzebla nur fare de lernontoj scipovantaj legi la italan lingvon. Verŝajne ne gravas la eduk-nivelo de la uzonto de la lernilo, sed en neniu recenzo estas mencio de la aĝ-nivelo. Ĉu la verko taŭgas por instrui Esperanton al lernejanoj? Junuloj? Nur plenkreskuloj? Ĉu la metodologio ebligas memlernadon aŭ ĉu la libro estas pli utila en kurso kun instruisto? Kiel estis kompilita la vortprovizo? Ĉu la aŭtoroj bazis ĝin sur studoj de morfem-ofteco en Esperanto aŭ ĉu ili elektis vortojn laŭ la enhavo de la tekstoj? Sur kiu nivelo de lingvoscio estos la lerninto post la 15-a leciono? Kiel li povos uzi la lingvon pasive kaj aktive? Kiom da gramatikaj temoj restos por plua studado?

Tiuj demandoj kaj pluraj aliaj devas esti pritraktitaj en recenzo pri

lernolibro. Estas emfazinde, ke ne iu ajn esperantisto estas kompetenta recenzi lernolibron; pro la sama kialo, ke ne iu ajn esperantisto kapablas instrui la lingvon. Entuziasmo kaj bona volo ne sufiĉas; nepre necesa estas ankaŭ fakscio. Kalocsay iam diris, ke oni povas lerni Esperanton per iu ajn lernolibro. Konsentite, sed ju pli bonkvalita estas la lernilo, des pli efika estas la lernado. Recenzanto de lernolibro havas la taskon profunde analizi ĝin kun la celo objektive mezuri ĝian taŭgecon por instrui Esperanton.

***nadiro** (aldone al la difino en PIV) – 2. (f) plej malalta grado.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (ILEI)
19-a Internacia Konferenco
Kungälv (Svedujo) — 22-29 julio 1985
(Nordiska Folkhögskolan) — Nordia Popolaltlernejo

Rezolucio

La 19-a Konferenco de la Internacia Ligo de la Esperantistaj Instruistoj, okazinta de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1985 en Kungälv (Svedio), okupiĝis pri la temo "English *yes* – Esperanto *jes* — Lingvoj kiel partneroj".

Traktante kaj pridiskutante la temon, la Konferenco resume rekomendas kaj sugestas konsideri jenajn punktojn:

- Komuna Eŭropa Dua Lingvo estas urĝe bezonata, ĉar ĝi interligas la eŭropajn popolojn kaj kreas tian solidarecon, kiu estas bazo de komunaj agoj;
- la plurlingveco, t.e. lerni laŭeble plurajn lingvojn, signifas malŝparon de valora lernotempo kaj krome komplikigas solvojn de komunaj taskoj;
- por la eŭropaj popoloj restas nur du eblecoj: aŭ akcepti ian nacian lingvon, aŭ alternative ekzistantan planlingvon;
- inter la naciaj lingvoj defakte la angla lingvo estas la plej uzata kaj plenumas diversspecajn vivnecesajn taskojn;
- tamen ĝi riskas perdi sian identecon;
- Esperanto kiel sola funkcianta kaj vaste uzata planlingvo kapablas partnere solvi la lingvan problemon en la mondo;
- la lernado de Esperanto komenciĝu kiel baza lingvo en la lernejoj kaj estu instruata en publikaj kursoj;
- kongresoj, konferencoj kaj internaciaj parlamentoj uzu la avantaĝojn de Esperanto;
- Esperanto de partnera lingvo evoluu iom post iom al sola Komuna Dua Lingvo.

LOKO DE ILS:

Internacia Lerneja Semajno
okaze de la Centjara Naskiĝtago
de Esperanto

Internacia Lerneja Semajno okazos dum la 21ª ILEI Konferenco, en julio 1987 en la urbo GDANSK, Pollando, antaŭ la Varsovia jubilea Kongreso de UEA.
Estos organizotaj internaciaj klasoj, ĉiu-tage okazos 3 studkoroj pri Esperanto poemoj, rakontoj, lingvaj ludoj, ŝercaj lingvo – ekzercadoj; kantoj, desegno, gimnastiko, art – historio – folkloro, geografio.

ALVOKO: a/ Ĝis la jubilea jaro ILEI intencas havi sekciojn en ĉiuj landoj, kie ekzistas minimume 5 esperantistaj pedagogoj.
Ni petas tiujn kolegojn, kiuj entreprenas fondi kaj estri sekciojn en tiaj landoj bonvolu peti informojn de la Vicprezidanto (E. Symoens)!

b/ La nunaj Sekciestroj estas petataj:

b1: bonvolu. fari detalan raporton / jaran 1985 / pri la nuna stato de la lerneja kaj eksterleneja instruado de Esperanto en sia lando;

b2: bonvolu. raporti pri la rilato kun la landa UNESKO – komisiono, ŝtataj klerigaj instancoj kaj landaj Esperanto-Asocioj;

b3: bonvolu. sendi la liston de E-istaj kaj Esperanto-pedagogoj kaj instruantoj: nomo, hejma adreso, lerneja adreso, fako.

b4: bonvolu. prilabori laborplanon por la jaro 1986: kion vi planas fari por plibonigi la situacion, progresigi nian aferon, altigi la nombron de ILEI membroj tiel, ke ĝis la jubilea jaro kiel eble plej multe da Esperanto-pedagogoj estu membroj de ILEI. Nur unuigante niajn fortojn ni povos sukcesigi kaj realigi nian lernejan agadon!

La materialon de b1 ĝis b4 bonvolu. sendi al la Ĝenerale Sekretario (C. Dazzini) ĝis la fino de decembro.

ALVOKO AL KUNLABORO

– Krom la ĝisnune ekzistantaj Kunlaborantaj Organizaĵoj (vd. kovrilpaĝon de IPR) ni alvokas novajn institucioj̆n al kunlaboro.

– konsiderante, ke la problemaro de Esperanto-instruado, ĝia instituigo kaj la problemaro de esperantistaj instruistoj kaj Esperanto-instruantoj estas unu el la ĉefaj nuntempaj problemoj;

– ni konstatas, ke pluraj institucioj laboras por la sama celo, nehavante rilatojn inter si kaj ne kunordigante siajn aktivecojn;

– tiel la profesia organizaĵo de la Esperantistaj pedagogoj alvokas al kunlaborado kaj siaflanke entreprenas la kunordigadon de tiuj aktivecoj;

– estimante ĉiam la sendependecon de ĉiu alvokata institucio, petante ilin akcepti la statuson de "aliĝinta institucio" kaj reciproke informante unu-la-alian pri la agado, por ke ne okazu trakovraĵoj kaj;

– unuigante la fortojn ni pli efike povu labori por atingi la celon, al kiu ni ĉiuj strebas.

– Tiu Instituto, kiu akceptas nian proponon estas petata sendi siajn informaĵojn kaj programon al la Vicprezidanto de ILEI, kiu, kunordiginte la programojn post zorga redaktado eldonos apartan broŝuron: KUNORDIGITA PROGRAMO pri EDUKADO - INSTRUADO per kaj pri ESPERANTO.

– Ni petas nepre respondi ĉu pozitive, ĉu negative, al tiu nia alvoko.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo	: Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj) P. F. 804 A-8011 Graz.
Belgujo	: Marc Demonty - Avenue des Missionnaires 39/B5 – B +1080 Brussell.
Brazilo	: Elvira Fontes - Rua Machado de Assis, 243 ap. 11 – 04106 Sao Paulo SP.
Ĉinujo	: Zhang Danchen Huazhong, Normal Universitato Hubei Wuhan.
Danujo	: Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo	: Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F. R. Germanujo	: Sonnabend Ruff Karin, Rodeweg 8 3155 Edemissen.
Grekujo	: K. Koliopoulos, str. Melissou 1, Pagrati, Gr - 11635 Ateno.
Hispanujo	: Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hungarujo	: Márta Kovács Ady E. u. 23-25/C H-1221 Budapest.
Israelo	: Josef Murĵan, p.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo	: Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa.
Jugoslavio	: Anica Hurĉak, Polic-Kamova 91/III, Yu - 51000 Rijeka.
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, 8162 NC Epe.
Nordameriko	: Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Pollando	: Irena Szanzer Lewartowskiego 9 m. 17 PL- 00185 Warszava.
Portugalio	: Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26 2° p. – 1900 Lisbono.
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio, 51 – I-47031 Repubblica di San Marino.
Sud-Afriko	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo	: So Gil Su – Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.

Individuaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26215 Borotice.
Ĉinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R.	: Til Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Luksemburgo	: Robert Hoegener, 4 rue des Charbons, Esch-sur-Alzette.
Malagasujo	: Eugene Raveloson, B.P.1663 – 101 Antananarivo.
Malta	: Anthony Mercieca – 20 Valletta Road – Qormi.
Sovetujo	: Johannes Palu, Sölme 21, SU – 200016 Tallinn, Eesti NSV.

Kunlaborantaj Organizajoj

EEC	Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio). Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.: S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
	Féderation Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne – 35 Avenue Jottrand 1030 Bruxelles – Belgique. Tel. 02 277 49 36. Esperanto I, rue Galissonniere – Le Pallet – F - 44330 Vallet - Francio
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA	Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris. Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko: Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare
redaktas: Helmut Sonnabend, Rodeweg 8 3155 Edemissen
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (40 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon de IPR.

abonprezo por nemembroj: 40 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)

2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 — UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro